

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 8-a parto  
Claude Gacond, 272-a radioprelego, 1968.12.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la rakonton pri la restado de Gandhi en Svislando, ĉerpante el la memor-libro de Romain Rolland.

A.- Estas la 10-a de decembro. Ĝus okazis mitingo en Ĝenevo. Gandhi revenas en Territet sen esti konsentinta la petitajn aŭdiencojn. Li deziras profiti la lastajn horojn de sia restado en Svislando por renkonti kaj dialogi kun Romain Rolland. Sen ripozi li do tuj iras viziti la francan verkiston. En tiu antaŭlasta dialogo Romain Rolland kaj Mahatma Gandhi tre longe parolas pri sia komuna kredo en la forto de la Vero.

Cl.- Kiel ni jam raportis en alia prelego, Gandhi konsideras, ke la Vero estas Dio. Por Romain Rolland la Vero estas la Absoluto. Por ambaŭ homoj la Vero troviĝas en la centro de iliaj penso, agado kaj verkado. Por servi la Veron ili ĉion oferis. Oni komprenas, ke ili deziras interŝanĝi siajn eksperimentojn pri la servado al komuna idealo : la Vero.

A.- Unue Romain Rolland longe parolas pri sia persona evoluo. Liaj diroj kaj la respondoj de Gandhi ŝajnas al ni bela mesaĝo por Kristnasko 1968-a. Aŭdu erojn el la paroloj de la amiko de Gandhi:

Cl.- « *Mi pensis pri via respondo al demando okazinta dum la mitingo en Lausanne : « La Vero estas Dio » kaj pri tio, kion vi skribis kaj diris, ke, ĉe vi, tio estas natura sento jam ekde la infaneco, dum la satjagraho, la neperforto ne estas natura sento ! »*

A.- Kaj Romain Rolland daŭrigas :

Cl.- « *Mi faris mian pens-ekzamenon. Mi trovis ĉe mi, ekde la infanaĝo, la senton, ke la vero pri si mem estas aĝo viv-esenca. Se oni ĝin ne posede celas, ĉio estas putra, kaj tiam nenio povas esti konstruata sur tia fundamento. »*

A.- Tiam Romain Rolland distingas du gradojn en la obeo al la vero :

Cl.- « *Sed ekzistas la vero por si mem, kaj la vero por la ceteruloj. En la asfiksia atmosfero de la urbeto, kie mi vivis, mi sentis la neblon esprimi tiun duan veron. Ĉie regis la premiga trudo familia, eklezia, lerneja, societa. Kiel febla knabo mi suferis pri tio, sed ĉar la ceteruloj tion akceptis, tiam mi provis kredi, ke tiel devas esti. Mi afliktiĝis pro nekapablo kredi la religiajn misterojn al mi tiam instruataj ; mi vidis la aliajn kredi, kaj mi ne povis imagi, ke ili mensogas aŭ mensogas al si mem. »*

A.- Romain Rolland tiam rakontas al sia amiko Gandhi, ke por povi servi la veron, li rezignis pri la komencitaj studoj :

Cl.- « *Ĉirkaŭ miaj 14- aŭ 15-aj jaroj fariĝis al mi ankoraŭ pli penige. Estis en Parizo la luktado por la vivo, la ekzamenoj, la lernejoj : en multaj okazoj estas neeble esprimi sian veran penson, tio eĉ je la intelekta nivelo. Tiam ekzemple regadis en la alta Universitato oficiala spiritualismo. En la ekzamenoj oni devis ŝajnigi kvazaŭ oni konsentis pri tio. Mi ŝatis filozofion kaj mi intencis min dediĉi al ĝi; sed mi rezignis pri ĝi en la lernejo **Ecole Normale** por ne esti devigata fari verkojn aŭ deklarojn, en kiuj mi estus devinta mensogi. »*

A.- Poste Romain Rolland raportas al Gandhi pri sia tiama soleco :

Cl.- « *Kiam mi fine komencis iĝi sendependa, kion mi kostege pagis je la prezo de kvazaŭ komplete soleco, kiu daŭris dekon da jaroj, tiam mi troviĝis antaŭ nova malfacilaĵo ankoraŭ pli peniga ol la ceteraj : mi vidis la malbonon, kiun povas fari la vero super la homamaso. La vero, kiu estas por mi bona kaj necesa. Kaj tio estis mia plej granda malfacilaĵo. »*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 8-a parto  
Claude Gacond, 272-a radioprelego, 1968.12.25 & 28

A.- Romain Rolland mencias la problemojn, kiuj sin prezentas por verkisto je la servo de la vero:

Cl.- « *Mi trovigis antaŭ tiu verkista problemo : kiel plene esprimi la veraĵojn, kiujn mi konceptas, sen ke ili vundu aŭ frenezigu tiujn, kiuj estas tro feblaj por ilin virece akcepti ?... Neniam mi perfidis mian veron ; kaj mia maltrankvilo, ke ĝi estu danĝera, parte etiĝis pro mia tiama malkovro, ke la neplaĉa vero ne estas komprenata aŭ aŭdata : la homoj ĝin adaptas laŭdezire. Sed tiu malkovro estis sen ĝojo. »*

A.- Romain Rolland longe parolas pri la vero en la arto. Li pensas, ke la belo kaj la ĝojo estas akompanantoj de la vero. Li ne povas akcepti la penson, kiun oni atribuis al Gandhi, ke la sufero estas agrabla al Dio.

Cl.- Gandhi respondas, ke li samideanas. Por li la vero estas por ĉiuj la sama, sed en la vivo ĝi manifestiĝas mult-maniere. Li ankaŭ pensas, ke la arto devas servi la veron. La formulo **la arto por la arto** kaŝas pens-malplenon. Li donas multajn ekzemplojn el la hinduaj kaj persaj literaturoj. Kaj li memorigas, ke oni ne devas konfuzi la obstaklojn, kiuj baras la vojon al la vero, kun la sufero.

A.- Gandhi pensas, ke la serĉanto trovas sian ĝojon ĝuste en la faligo de tiuj baroj. Romain Rolland respondas :

Cl.- « *Mi sampensas. Sed mi ne nur parolis al vi pri la malfacilaĵoj renkontataj de la serĉantoj ; tiujn malfacilaĵojn mi akceptas kaj ŝatas. Mi pensas al alia sufero, tiu de la **respondeco**. La pensulo, kiu ne timas la veron por si mem, timas ties rezultaton por tiuj, kiujn li skuas. La grandaj malkovroj de la Scienco – far Kopernik kaj la herooj de la penso, kiuj sekvis – ŝanceligis milionojn da homoj el ties fido. La vero ĉiam antaŭeniras, kaj ĉiujn ne kapablas ĝin sekvi sen anhelaj kaj angori. La transira vero estas ofte tre dur-kora por la plej granda nombro. Mi parolas pri tiu doloro kaj ne pri la mia. »*

A.- Gandhi aldonas : « *Mi diras, ke devas ekzisti kontenteco, ĉar tiel estas la neceseco. »*

Cl.- Li citas hindan proverbon :

A.- « *La serĉanto al la vero havas la koron mola kiel la lotuso kaj malmola kiel la granito. »*

Cl.- Konklude al tiu dialogo pri la vero Romain Rolland legas al Gandhi du pensojn de Goethe :

A.- « *Mi preferas la nocan veron al la utila eraro ; la vero kuracas la doloron, kiun ĝi eble okazigas al ni. La noca vero utilas, ĉar ĝi povas naci nur momenton kaj ĉar ĝi poste kondukas al aliaj veroj, kiuj ĉiam pli utilos ; kontraŭe utila eraro nocas, ĉar ĝi kapablas helpi nur momenton, kaj ĉar ĝi devojigas al aliaj eraroj, kiuj iĝos ĉiam pli nocaj. »*

Cl.- « *Ĉiuj leĝoj kaj ĉiuj moralaj reguloj resumiĝas en unu sola : vero. »*

A.- Gandhi aŭskultas, kapsignas, konsentas. Sed Romain Rolland aldonas : « *Estas ofte penige! »*

A.- Gandhi : « *La ĝojo konsistas en tiu peno. Ĝi troviĝas en tiu malmoleco, tiu firmeco. »*

Cl.- La ĉeestantoj ridas, kaj komprenigas, ke **Bapu**, tio estas la nomo, kiun ili donas al Gandhi, praktikas tiun ĝojon !

A.- Gandhi ridas kaj aldonas : « *Oni diras pri mi : dolĉa kiel bovino ! »*

Cl.- Romain Rolland : « *En Okcidento oni diras dolĉa kiel ŝafo ! »*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 8-a parto  
Claude Gacond, 272-a radioprelego, 1968.12.25 & 28

A.- Gandhi : « *Dolĉa kiel bovino kaj maldolĉa kiel tigro !* »

Cl.- Romain Rolland: « *Mi ne kompatas la gvidanton. Mi kompatas la malfortulojn, kiuj lin sekvas!* »

A.- En tiu dialogo Gandhi kaj Romain Rolland ne nur filozofias. Ili entuziasme parolas pri la hodiaŭaj malkovroj de la sciencistoj, kaj Gandhi montriĝas optimista : « *Se tiuj malkovroj povas konduki la homaron ĝis abomenaĵoj, tio estas nur dum momento.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-